

SVENSKA
ESPERANTO-
TIDNINGEN

La Espero

1998:1



”Aktiva” i Helsingborg ger skäl för namnet

29 elever i Helsingborg från gymnasieskolorna Olympia, Tycho Brahe och Nicolai har anmält sig till esperanto som fritt val, i en kurs på 60 poäng omfattande 4 lektioner i veckan.

Ett 20-tal elever har redan gått en nybörjarcirkel på Olympiaskolan och anslutit sig till den lokala esperantoklubben (se bild). Detta betyder att det är ett 50-tal elever som berörs.

De elever som redan gått cirkeln kommer troligen att få möjlighet att tentera av det eller att få avlägga ett prov så att de kan få infört detta i sina betyg. Vid samtal med en av rektorerna, som var mycket positiv, uttryckte denne möjligheten att också omfatta den tredje årskursen.

LA ESPERO

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694
Februaro 1998 • 86-a jarkolekto
Fondita en 1913

Redaktion:

Jan Setréus
Franko Luin (teknisk redaktör)

Frågor om prenumeration o. dyl.:

Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,
113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00

E-post: espero@esperanto.se

Ansvarig utgivare: Leif Nordenstorm

Utformning: Omnibus Typografi, Tyresö

Tryck: HA Reklamtryck, Stockholm

Prenumeration 1998: 170 kr.

Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

ESPERANTOFÖRBUNDET

Adress: Esperanto-Centro,
Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm,
tel. 08-34 08 00, fax 08-34 08 10

E-post: sef@esperanto.se
www.esperanto.se

Öppettider: Esperanto-Centro har flexibla öppettider dagtid. Ring i förväg!

Postgiro: 20 12-3, Esperantoförbundet

Medlemsavgift 1998:

Direktansluten medlem 170 kr.
Famijmedlem (utan tidning) 75 kr. Ungdomsmedlem (max 20 år) 75 kr. Medlemmar under 30 år samtidigt medlemmar i Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund och får dess tidning *Kvinpinto*.

ESPERANTOFÖRLAGET

Adress: Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm

Telefon: 08 - 34 08 00

Fax: 08 - 34 08 10

Postgiro: 578-5

Hemsida: www.esperanto.se/eldona

Telefontid: Samma som EsperantoCentro Stockholm.
Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

Styrelsens ordförande: Tomas Jansson,
Seminariégatan 3 A, 752 28 Uppsala

Manus till La Espero
sänds till Jan Setréus
Mörtg. 7 SV, 133 43 Saltsjöbaden
(tel./fax 08 - 717 75 67)

La Espero estas presata  sur recikligita papero.

PREZIDANTO

Kio okazas en Helsingborg?

Sur la frontpaĝo de ĉi tiu gazeto vi povas legi, ke 29 gimnazianoj elektis esperanton kiel studobjekton por venonta studjaro. Kia bela novaĵo!

Kjell kaj Henrik (filo) Randeheed estas la veraj aktivuloj en la nova esperantoklubo de Helsingborg, la dua klubo, ĉar la origina klubo daŭre aktivas. Du kluboj en unu urbo ŝajnas esti signo de malpaco inter du grupiĝoj. Tiel ne estas en Helsingborg. Estis ĝenerala konsento pri dua klubo kaj ankaŭ okazis komuna aranĝo pri informado.

La frontpaĝa bildo montras kelkajn membrojn de la nova klubo. Notu, ke estas gejunuloj!

La Espero ŝanĝis tiparon en ĉi tiu numero, de "Esperanto" al "Devin", kies minuskloj estas pli altaj. Kion vi opinias?

En Stokholmo en majo

La konferenca hotelo (Fogg's Hotel) por nia SEF-kongreso la 16-an - 17-an de majo estas konvena por kongresoj kiel nia. Inter la prelegantoj ni aŭskultos sinjoron Adolf Burkhardt el Germanio. Tiuj, kiuj memoras lin de la SEF-kongreso en Höör ankaŭ scias, ke li estas aŭskultinda persono, eĉ senrigarde al la temo.

La hotelprezoj estas kiaj ili estas en la Stokholma regiono. Nek malaltaj nek terure altaj.

Tiuj, kiuj venas de lokoj ekster Stokholmo kaj bezonas hotelĉambbron, atentu ke nia kongresa hotelo ne havas multajn ĉambrojn je dispono. Estas praktike loĝi plej proksime al la kongresaj ejoj, ĉar vojaĝoj ene de Stokholmo ankaŭ kostas.

Do, bonvenon al la ĉijara kongreso!

Roland Lindblom


NI PREZENTAS

Jan

Jan Setréus, anstataŭanto de SEF. Naskiĝis en Stockholm en 1952. Kiu estis mia unua vorto mi ne memoras, nur ke mi dek ok jarojn poste penis instigi mian unuan ĵurnaskitan nevinoŝin diri "elementa korpusklo", sed vane. Iel miaj gepatroj al mi altrudis poliglotecon, pri du vortoj. Havante propran ĉambbron en la hejmo, por eviti la cigaredfumon, mi fermis la pordon kaj afiŝis surporde la vortojn "Nenia fumado" en multaj lingvoj i.a. en Esperanto. Mi mem neniam fumis kaj miaj gepatroj ne plu ekde multaj jaroj. Eble indiko pri mia obstineco, sed mi preferas diri ke mi estas rezoluta (laŭmemore la "superlativo" de la "komparacio" de B. Russell estis "azena").

En 1975 mi lernis Esperanton en studrondo, kaj subkonscie interpretis la titolon "Ek!" de la lernolibro kiel Eterna Komencanto. Poste eterniĝis ankaŭ mia stakata balbutado de sva-

hilo kaj la hispana, dum du-jaraj loĝadoj en Tanzanio kaj Bolivio respektive. Ĝis la pasinta jaro mi estis instruisto pri fiziko kaj matematiko, sed nun laboras kiel "laŭtleĝisto" de studliteraturo, la destino tiel venĝinte mian maljustaĵon kontraŭ mia nevino.



En 1998 ni revenas al Stokholmo por kongresi

Fariĝis preskaŭ tradicio, ke la svedaj esperanto-kongresoj okazas en la ĉefurbo, kiam ni iel jubileas. Ĉijare la Esperanto-Klubo de Stokholmo festas 100 jarojn de organizita esperanto-laboro. La klubo festos tion ankaŭ mem, sed ni kolektiĝos la 16-an kaj 17-an de majo kaj iom hurao al ili, ĉu ne?

La programo komenciĝos tuj matene en la sabato, tial vi eventuale planu vian alvenon vendrede vespere. Okazos neformala programo ankaŭ en la vendredo. La detala programo ankoraŭ ne estas preta, sed ĝi aperos en *La Espero* n-ro 2, kiu atingos vin antaŭ la kongreso. Tiu numero enhavas ankaŭ la jarraporton de SEF.

Kongresa hotelo

Nia kongresejo estos hotelo *Fogg's*, kiu situas tuj trans la limo inter Stokholmo kaj Nacka. Ĝi estas facile atingebla per trajno (Saltsjöbanan) kaj aŭtobuslinioj ek de la metroa stacio Slussen.

En la hotelo okazos ĉiuj kunsidoj de SEF kaj la apartaj kunsidoj de SEJU, Eldona Societo-Esperanto kaj svedaj sekcioj de ILEI kaj KELI. Ankaŭ la manĝoj okazos en la hotelo kaj ni rezervis kvanton da ĉambroj por tiuj, kiuj bezonas tranokti.

Nia speciala gasto-preleganto estos Adolf Burkhardt el Germanio, kiu jam pli frue partoprenis kiel preleganto.

SEJU

SEJU okazigos sian jarkunvenon samtempe kun SEF. La loĝeblecoj por SEJU-membroj estos iom pli simplaj - kaj malpli kostaj. La estraro de SEJU informos la membrojn aparte pri la eblecoj.

Kultura ĉefurbo

Dum tuta 1998 Stokholmo estas la kultura ĉefurbo de Eŭropo, kun aparte riĉa kultura programaro. Kaptu la okazon viziti kelkajn el ili antaŭ aŭ post la SEF-kongreso.

Viktigt veckoslut i Skövde 28 - 29 mars

- Môte för kloka hjärnor
- Hur når vi framgång i vår informationsverksamhet?
- Vilka argument fungerar bäst?

Brev har redan sänts till klubbarna i landet om behovet av en ny inriktning för vårt sätt att bedriva information, och i brevet inbjuds klubbrepresentanter. I övrigt finns det säkert en och annan vid sidan av klubbarna som skulle kunna bidra med goda idéer.

Kampanjo 2000 finns omnämnd i detta nummer, och det hänger i högsta grad ihop med de kommande överläggningarna i Skövde. Även om du inte kan delta i mötet bör du läsa igenom artikeln, som berör det som

UEA:s beslutande församling (*Komitato*) kommit överens om att försöka leva upp till.

Tyvärr finns det inte pengar i SEFs kassa för att bekosta deltagares kostnader. Det vi kan bjuda på är kaffe och någonting till, samt en något subventionerad kvällsmåltid. Vi börjar omkring kl. 13 på lördag och avslutar vid 13-tiden på söndag.

Behöver du övernattning, ska du ringa till **Börje Andersson** i Skövde, tel. 0500 41 22 05. Anmäl dig till Börje även om du inte behöver hjälp med rumsanskaffning.

Roland Lindblom
för SEF:s styrelse

Kotizoj kaj prezroj

KIOM KOSTAS?

Antaŭ la 10-a de aprilo

A	Aliĝkotizo + 1 tranokto en 2-lita ĉambro (sabato-dimanĉo) + ĉiuj manĝoj	1100:--
B	Aliĝkotizo + 1 tranokto en 1-lita ĉambro (sabato-dimanĉo) + ĉiuj manĝoj	1350:--
C	Aliĝkotizo + 2 tranoktoj en 2-lita ĉambro (vendredo-dimanĉo) + ĉiuj manĝoj	1450:--
D	Aliĝkotizo + 2 tranoktoj en 1-lita ĉambro (vendredo-dimanĉo) + ĉiuj manĝoj	1700:--

Se vi pagos post la 10-a de aprilo, aldonu 100:--.

Por membroj de SEJU validas speciala prezaro dissendota aparte.

APARTA PREZARO

Kongreskotizoj

Pago ĝis la 10-a de aprilo	250:--
Pago post la 10-a de aprilo	350:--

SEJU-membro malpli ol 20-jara:

Pago ĝis la 10-a de aprilo	100:--
Pago post la 10-a de aprilo	150:--

Loĝado po persono

Du-lita hotelĉambro + matenmanĝo (po nokto)	350:--
Unu-lita hotelĉambro + matenmanĝo (po nokto)	600:--

Unuopaj manĝoj

Sabate:	kafo (antaŭtagmeze)	35:--
	lunĉo	110:--
	kafo (posttagmeze)	35:--
	vespermanĝo	175:--
Dimanĉe:	kafo (antaŭtagmeze)	35:--
	lunĉo	110:--


Aliĝo per pago al poŝtĝiro 481 43 95-2, SEF-jarkongreso. Indiku vian adreson kaj kion vi mendas.

Plej lasta aliĝdato por loĝado estas la 10-a de aprilo. Post tiu dato ni ne povas garantii loĝadon laŭ via deziro.

Se vi havas demandojn, telefonu al Franko Luin (08 - 712 82 91), Bengt Nordlöf (08 - 93 41 70) aŭ Roland Lindblom (08 - 777 41 75).

Adreso: Esperanto-kongreso, Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm.

Fora lando Nov-Zelando



Postkongreso en Nov-Zelando donis al mi profundan impreson en diversaj flankoj. La faktoj estas jenaj: Nov-Zelandaĵoj civitanoj konsistas el 81% de eŭropa deveno, 13% Maorioj, 3% Polinezianoj kaj la resto estas aliaj rasoj. Angla kaj Maoria lingvoj estas oficialaj. Vivlongo de Nov-Zelandaĵoj estas 73 jaroj por viroj kaj 78 jaroj por virinoj. Analfabetoj estas nur 1% de civitanoj.

Mia edzo kaj mi atingis Aŭkland-flughavenon preskaŭ noktomeze la 30-an de julio. Unua Nov-Zelanda bildo en mia kapo fotiĝis ke Maorioj kaj blankuloj laboris kune kaj harmonie. Koscie mi rigardis, daŭre sekvis iliajn laborojn por kapti atmosferon ĉirkaŭ ili. Trankviliĝinte mi ne plu sekvis ilin.

Montriĝis, ke naŭ esperantistoj alvenis per sama aviadilo. Ni kune aranĝis minibuson kaj atingis nian hotelon ĉirkaŭ la unua matene. Dum pluvetis sed dum la nokto pluvegis.

Submara mondo de Kelly Tarton
Post matenmanĝo (31/7) nia aventuro komenciĝis per du Volvo-busoj kun pli ol 70 partoprenantoj. La ĉiĉerono estis Brad R. Mc Donald. La plej unua vizito estis submara Mondo de Kelly Tarton kaj Antarkta Renkontiĝo. En mallumo ni ĉirkaŭveturis per malgranda vagono rigardante submaran mondon kaj renkontis pingvenojn. Paliĝintajn historiajn restaĵojn ni rigardis tie. La tempo ĉesis tie kun malheliĝinta koloro kaj polvo.

Post la muzeo ni rigardis bazaron. Eĉ en malgranda manĝvendejo troviĝis multnacieco. Unu ĉina virino tre aktive logis gastojn, gustumigante siajn pladojn. Konvinke ni aĉetis ŝiajn manĝaĵojn. Post lunĉo ni daŭrigis veturadon al urbeto Rotorua. Kiel fluanta verda akvo la pejzaĝo onde preterpasis. La naturo estis fekunda, tie paŝtis sin ŝafoj, bovoj kaj bovinoj eĉ cervoj proksime de Rotorua. Bredi cervojn estas nova tendenco de investado en Nov-Zelando. La naturo similas la fantaziplenan infanpentraĵon kun ĉarmaj ŝafoj kaj liberaj bovinoj kun peze pendantaj mamoj, tie sunbrilis hele. Mi estis naive impresita de la bela kaj mildforma naturo ĝis

kiam nia ĉiĉerono klarigis ke la ondforma paŝtejo estas tre ĝena por la posedantoj. Kiam ili devas tranĉi herbojn, tiam ili devas esti ege zorgemaj pri la ondforma tereno, alie la traktoro renversigas kaj ili danĝere vundiĝas kutime. Brad tre bone klarigis dum nia veturado pri la naturo, historio, politiko kaj ekonomio de Nov-Zelando. La stato de Maorioj kaj blankuloj egalas. Sendube mi konstatis tion. Jam de longe, antaŭ pli ol unu-cent jaroj militis Maorioj kaj eŭrope devenaj blankuloj je la punkto de diskuto pri "Lando de blankuloj aŭ ne". Maorioj kuraĝe kaj brave kontraŭ-batalis kaj mortis pli ol 50% el ili. Tamen ili gajnis sian rajton. Laŭ mia memoro preskaŭ 80% da nomŝildoj estis skribitaj en Maoria lingvo kaj en nove konstruita loko troviĝis angla nomo. Ne nur batali por sia rajto, sed ankaŭ interdiskuti kun blankuloj kaj mem prizorgi propran kulturon estis maoria strebo. Saĝaj maljunuloj de Maorio subtenas kaj kuraĝigas gejunulojn por edukado en ambaŭ lingvoj.

Rotorua

Vespere ni atingis vulkan-regionon Rotorua. Ni vespermanĝis kaj ni kun geamikoj haste kuris al varma banejo. Varmaj basenoj en diversaj gradoj, la plej laste ni enmetis nin en 45 grada baseno, sen tegmento, malvarma aero ĉirkaŭ niaj ŝultroj. Multaj lernantoj el Japanio kaj Koreio svarmis kaj babiladis. Mi ankaŭ babilumis kun koreaj knabinoj. Ili estis en studa vojaĝo en Nov-Zelando.

Maoria kulturo

Venontan tagon (1/8) ni vizitis muzeon (Maoria Arta kaj Metia Instituto), maorian preĝejon, bestoĝardenon, gejserojn, bolantajn kotflakojn. Blan-

ka vaporo el varmega akvo kaj odoro de sulfuro en la aero.

"Mi estas en la sonĝo, ne, mi estas meze de la mito!" mi murmuris.

Maoria gvidantino akceptis nin per maoria tradicia "hongi" (saluto). Nazon ambaŭ flanke tuŝas unu la alian dum oni premas manon amike. Maoria kulturo prezentas Nov-Zelandon. La gvidantino montris kiel ili faras tradician jupon el folioj de plantoj. Nokta birdo kivio estas interesa. Birdino estas pli granda ol virbirdo. Kiam birdino lasas ovon, ŝi prenas ferion kaj virbirdo kuŝas sur la ovo por helpi elkovadon. Prizorgi elkovadon estas lia tasko. Ankaŭ "kiwi"-frukto (ĉina groso) estas monde konata kaj vitaminriĉa. Nov-Zelandaĵoj intencas ŝanĝi la nomon "kiwi" al "zespri." Oni povas kontroli mem, kiam oni aĉetas la frukton. En bestoĝardeno ni rigardis kanguruojn kaj mode vestitan elegantan nigran cignon el Aŭstralio, donaco de Aŭstralio.


Vespere ni havis "hangi"-feston en unu maoria vilaĝo. Ili akceptis nin per sia tradicia ceremonio. La ceremonio okazis sur korto antaŭ la vilaĝo. Kiam ni atingis tien, ni staris grupe kaj silente, absolute silente kaj aŭdis blonvon de "pukaea"-o, kiu anoncas al sia popolo proksimiĝon de alia grupo. Poste venis unu provokanta soldato batalpozicie por kontroli niajn gvidantojn; ĉu ni estas amikoj aŭ malamikoj. Se niaj gvidantoj timiĝus kaj montrus timemon aŭ maltrankvilon, la provokanto batus ilin. Tio fariĝus granda risko por ni, ĉar tio signifas ke ni estas malamikoj. Niaj gvidantoj trankvile agis kaj akceptiĝis, samtempe la provokanto ŝanĝis sian teruran mienon al amikeca bonveno.

Ili gvidis nin en grandan halon, tie ili montris tradician dancadon, kan-

Maori-popolo en kostumoj

Maoria skulptaĵo

Tradicia Maoria-Hongi (saluto) kun Pataka (magazeno) en la fono






Maoria kanuo-remkanto, Rotorua

tadon kaj klarigis pri tatuoj sur siaj vizaĝoj. Maorioj aspektis tre sane, forte, gaje kaj feliĉe. Ili dankis al siaj saĝaj prapatroj kaj maljunuloj, kiuj kuraĝigis kaj montris al ili kiel oni povas prizorgi sian kulturon kaj vivi egalvalore al blankuloj kaj daŭrigi bonan edukadon por gejunuloj.

Maori-soldato sonoranta "pukaea"-n, kiu estis plej ofte uzata por anonci proksimiĝon de alia grupo, Rotorua

Kiam la prezentado finiĝis, tiam mia stomako komencis kanti silente. Mia scivolemo pri maoriaj pladoj kuiritaj per vulkan-akvo aŭ vulkan-varmo, estis enorme granda. Vulkan-forno, tiel oni povas nomi ilian kuirfoston. Subtere, sengrase bakitaj bovo-



porco-, koko-viandoj, flavaj bulkoj kun diversflanke direktitaj kreskaĵoj donis tute ne atenditan guston. La gusto de bulko estis delikata en mia buŝo dum kaj post maĉado. Subite mi komprenis kial ili aspektis sanegaj, fortaj kaj gajaj. En la naturo sen media difekto, ili ricevas eble la plej puran subterforno kuiritan manĝaĵon. Ilia malferma karaktero eble pli gajigas ilin. Ili estas benitaj homoj, laŭ

Maoriaj soldatoj en tradicia provoka batalpozicio, Rotorua



mia kompreno kaj mezuro. Mi deziras ke polucio de medio ne okazu en Nov-Zelando. Preskaŭ ĉie oni suferas de la polucio. Mi vidis helbluan koloron tra fluanta akvo en Nov-Zelando. Ankorau mi havas unu memoron de tiom pura kaj blua akvo en la montoj en Koreio, sed ne plu estas tiel nun.

Al lago Taŭpo

Postan tagon (2/8) ni komencis veturi al lago Taŭpo. Survoje Brad klarigis ke kristnaskaj abioj tre bone kreskas sen malsano en Nov-Zelando, pro tio abio-kultivado estas nova projekto por eksporto. Ankaŭ ni rigardis termikajn fontojn, akvofalojn, geotermajn elektrejojn en Wairakei, kiu estas duavice konstruita en la mondo. Ni luncis en bredejo de grand-salikokoj. Oni importas fraĵon el Malajzio. Dum tri monatoj la fraĵoj kreskas en marakvo, kiun oni transportas el norda Nov-Zelando. Poste oni utiligas miksitan akvon kun termofont-akvo kaj malvarma riverakvo. La salikokoj vivas en akvo inter 19 gradoj kaj 30 gradoj, se la akvo estos malpli ol 19 kaj pli ol 30 gradoj la salikokoj mortos. Nov-Zelandanoj tre bone utiligas sian naturan disponon zorgeme.

Lago Taŭpo kuŝas sur la centra altebenaĵo en norda Nov-Zelando kaj estas turista loko. Ni nur tranoktis tie. Do mi aĉetis interesajn bildkartojn. Unu el ili estas pri maoria legendo de la montaroj: En la tempo de Dioj, multaj montoj vivis kune apud la lago Taŭpo. La plej grandaj estis Ruapehu, Taranaki, Ngauruhoe kaj Tongariro. Tongariro amis kaj edziĝis kun unu ĉarma malgranda monto, Pihanga, kiu vivis apude. Taranaki ankaŭ amis Pihanga-n, sed Tongariro koleriĝis kaj per granda fajro forigis li Taranaki-n okcidenten. Kiam Taranaki fuĝis, li tranĉis profundan kanalon, la Whanganui-riveron, kiu fluas ĝis la maro, tie li restis. Sen amo-motivo neniu rakonto fariĝus impona por Dioj kaj homoj.

Al Waitomo-groto

Venontan matenon (3/8) ni veturis al la Waitomo-groto, kie troviĝas kalkŝtonaj grotoj.

Dum nia veturado Brad respondis al niaj demandoj:


Jam de la jaro 1990 troviĝas dekunu parkoj kaj oni tre bone prizorgas ilin. Agopension en Nov-Zelando oni jam enkondukis en la jaro 1898. Lerneja sistemo estas 11-jara deviga, de la 6-a ĝis 16-a jaro, sed kutime infanoj komencas lernejon jam de 5-a jaro, poste gimnazio kaj universitato. Nuntempe okazas nova tendenco; kiel industrio kreskas unu speco de lernejo por instrui anglan lingvon al eksterlandaj lernantoj. Infanoj el orientaj landoj venas al Nov-Zelando por studi anglan lingvon. Iliaj gepatroj pagas por ilia studado kaj restado. Tamen infanoj estas infanoj, ili ne

lernas diligente kaj petolemas sur la stratoj. Tiaj aferoj kaŭzas kapdoloron, sed la eduka industrio donas profiton, pro tio daŭre kreskas la fenomeno, ankaŭ en Aŭstralio tiu programo estas populara.

Waitomo-groto konsistas el tri grotoj. Ni vizitis nur unu el ili. La groto estas unika kaverno en la mondo. La kialo estas jena: kutime en grotoj troviĝas alta humideco, sed tute ne en Waitomo-groto, kaj ĉiam estas kvin gradoj ene. Sen humideco estis tre agrable ĉeesti tie. Alia unikajo estas specio de lampiroj, kiuj troviĝas nur tie en la mondo. La vivciklo de ili estas en 4 fazoj, daŭrantaj entute 9 monatojn. Ovoj elkoviĝas post 3 semajnoj al larvoj, kiuj kreskas ĝis 40 mm longaj. Ili vivas sur fadenoj, manĝas insektojn logitaj de lumo de plenkreskaj lampiroj. Ĉiu lampiro pendigas 70 fadenojn dum 8 monatoj, sur la fadenoj troviĝas venenogutoj, kie gluifiksiĝas logitaj insektoj. La larvo ŝanĝas sin al kokono pendanta de la plafono. Post 2 semajnoj ili fariĝas plenaĝaj. La ino vivas 3 tagojn kaj la viro 4 tagojn, sed sufiĉe por daŭrigi la vivciklon.

Lampiroj estas tre sentemaj pri sono, tial neniu rajtis babili en la groto. Se iu babilus aŭ krius, lampiroj falus el la plafono kaj mortus. En la groto estis rivero kaj ni devis veturi boate sen remilo. La respondeculo prenis ŝnuron pendantan aere, samtempe li puŝis boaton piede, kiel tramo kun elektra kablo. Tute silente, sidante ni rigardis supren. Kia bela galaksio!! Mi malfermis mian buŝon kun longa spiro kaj nun memoro de vera galaksio, kiun mi vidis en mia junaĝo en alta monto, longe for de urboj kaj urbegoj. Pro la pura beleco mi perdis vortojn tiam kaj nun. Nekredeble. Kiam mi eliris de la groto, mi aĉetis bildkartojn pri la groto, precize pri la lampiro. Ekstere mi vidis monumenton, kiu montris klarigon pri la trovinto de la groto en la jaro 1887, en sama jaro Esperanto aperis en la mondo, bela koincido.

Ni revenis al la hotelo en Aŭklando malfrue posttagmeze. Tiun vesperon la urbanoj fieraj festis por nove konstruita turo, kiu estas due plej alta en subtropika sfero. Brad indikis ke tiuj, kiuj volis rigardi bone artfajradon, povus grimpi al la pinto de la monteto One Tree Hill. Ni du paroj entuziasme rapidis, sed eraran vojon ni prenis. En la mallumo ni kalkulis rektan vojon al la pinto, kaj kuraĝe komencis marŝi sur herbejon nesciante kia estis la loko. Niaj ŝuoj fariĝis pli kaj pli pezaj kaj dikaj pro malseka argilo kun velkitaj herboj kaj eble fekaĵoj de iuj bestoj. En Aŭklando pluvis ofte kaj la tero estis malseka. Ni preskaŭ batalis kontraŭ eventuala falo sur la koto aŭ fekaĵo. Unu paŝon antaŭe kaj barak-tado levi alian piedon jam fiksitan de argila tero. Tio estis vera koŝmaro.



LIFE CYCLE of the GLOWWORM

WAITOMO CAVES NEW ZEALAND

La vivocirklo de la lampiro (Waitomo-groto, Nov-Zelando)

- 1 kokono kaj fadenoj
- 2 fadenoj
- 3 larvo kaj vermo
- 4 lumo de lampiroj
- 5 plenaĝa lampiro

Kiam ni atingis asfaltan vojon, ni rigardis strange formigitajn ŝuojjn tra la lumo de preterpasantaj aŭtoj. Ni skuis kaj skrapis niajn ŝuojjn, kaj daŭrigis marŝi supren. Post tia ŝvito ni staris sur One Tree Hill, kaj niaj korpoj komencis malvarmiĝi. Akra vintra vento frapis niajn ŝvitajn vangojn. Ĝustatempe ni estis tie, sed bedaŭrinde nenio okazis, nur homoj daŭre venis kaj venis. Ni atendis dek aŭ dek kvin minutojn, poste ni ne plu eltenis malvarmegon. Interkonsente ni malsupren iris kontraŭ homamaso. Subite ni vidis gejunulojn, kiuj havis similan sorton kiel ni, ni ridegis kaj samtempe malaperis tiu malagraba sento, kiun ni havis dum kaj post marŝado. Ni troviĝis tute en alia flanko de nia hotelo. Promenante ni ekvidis fajrludon en la ĉielo. Tuj ni serĉis taksion kaj tiamaniere ni revenis al nia hotelo. Rapide ni ŝanĝis ŝuojn kaj rigardis la ĉarman fajrludon koridore kaj lastamomente. Malfruan, bongustan vespormanĝon ni havis kaj nokte purigis niajn ŝuojjn.

DONACOJ

Gurli kaj Gösta Nylin, Uppsala, "i stället för blommor till Karl Söderbergs 95-årsdag" 100.-
Sten Broman, Skövde 240.-

KLUBO CENT

Alice kaj Nils Johansson, Norrköping 200.-

SEF kore dankas pro la donacoj. Pliaj donacoj estas bonvenaj al poŝtĝiro de SEF 20 12 -3.

Aŭkland-muzeo

Lastan tagon (4/8) ni turstis per buso en la urbo. Antaŭ Aŭkland-muzeo ni ĉiuj fotiĝis en unu foto, sed multaj volis havi similan foton kaj ili donis siajn fotilojn al du ŝoforoj, kiuj fotis nin. Longa vico de fotiloj estis komika. Do mi fotis fotilojn kun du ŝoforoj anstataŭ partoprenantojn. Meze de la urbo, ĉirkaŭ la nova turo ni promenadis kaj vidis multajn ŝildojn en japana kaj korea lingvoj. Paralele varoj kaj homoj el du landoj troviĝis multe, sed ne tiom multe kiel en Aŭstralio. Ni lunciis en granda manĝvendejo en iu magazeno, kun internaciaj manĝaĵoj kiel en Aŭstralio. Ili havas similan sistemon de restoracio kaj vendejo, sed iliaj karakteroj estas tute aliaj: Aŭstralianoj estas malfermaj, gajaj, rapidaj kaj grandanimaj, sed Nov-Zelandoj estas trankvilaj, saĝaj kaj silentaj.

Dum la tago kelkaj partoprenantoj komencis veturi hejmen. Ni du paroj havis adiaŭnan festenon nokte kaj dormis nur iomete. Postan matenon je la sesa ni ekflugis, adiaŭis ĉarman Nov-Zelandon.

Boo Mee Kim-Lindblom

HISTORIO

La Espero antaŭ 85 jaroj

Komence de la jaro 1913 regis armistico en Balkanio, sed la trian de februaro la aliancintaj landoj Serbio, Bulgario, Grekio kaj Montenegro atakis denove Turkion. La sesan de marto la grekoj konkeris la ĉefurbon de Epiro, Ioanina. La dek-okan de la sama monato Georgo la Unua, la reĝo de Grekio, estas murdita en Saloniko, sed la grekoj ne estis haltigitaj, kaj baldaŭ Turkio devis cedi preskaŭ ĉiujn siajn teritoriojn en Eŭropo escepte de Konstantinopolo.

En Usono la demokrato Woodrow Wilson estis elektita nova prezidento pro konflikto inter la respublikana kandidato prezidento W.H. Taft kaj la antaŭa prezidento T. Roosevelt.

En Ĉinio Juan Ŝi-kaj fariĝis la unua prezidento de la respubliko, kiu fondiĝis la jaron antaŭe sub gvidado de Sun Jatsen. Tiel finiĝis la lasta imperiestra dinastio, la Ĉing-dinastio.

En Gävle en Svedio la loka Esperantoklubo Gefle Esperantoförening havis sian jarkunskidon la 5-an de januaro. Oni elektis novan estraron kies prezidanto fariĝis Oscar Pierrou. La plej grava decido dum la kunsido tamen estis ke oni eldonu nacian Esperanto-gazeton kun la nomo *La Espero*. En februaro estis eldonita la unua numero de tiu gazeto, redaktita de R. Pehrsson, sekretario de la klubo. Respondeca eldonanto estis W. Wahlund, kiu ankaŭ respondecis pri la kaso de la klubo.

La gazeto havas ok paĝojn de formato A4. La unua artikolo sub la titolo Anmälän motivigas la eldonon de la gazeto. Alia artikolo, ankaŭ en la sveda estas dialogo inter esperantisto kaj lia amiko, kiu unue estas tre skeptika rilate Esperanton, sed baldaŭ promesas aĉeti kvin-oeran libreton kiu laŭdire enhavas "la tutan gramatikon kaj sufiĉan vortareton". En tria artikolo oni demandas sin ĉu oni jam nun povas utiligi Esperanton.

En Sveda kroniko, la unua artikolo en Esperanto, oni i.a. ripetata la motivojn por la nova gazeto. Oni ankaŭ mencias viziton de Profeso A. Plitik el Prago en Bohemio al Svedio en aprilo. La sekva artikolo defendas la tabelvortojn de Esperanto komparante ilin kun similaj serioj de vortoj en naciaj lingvoj. Sub la rubriko Jordan runt, do la nuntempa Tra la mondo, oni informas pri Esperanto en pluraj landoj. Kompreneble la redakcio ankaŭ informas pri UEA kaj pri la sekvonta Universala Kongreso en Bern. Eble la kotizo de 11 kronoj povus tenti iun esperantiston de hodiaŭ revii pri feliĉa pasinteco. Oni gratulas la policanon A.K. Öhrn, vicdelegito de UEA en Gävle, kiu fianĉiĝis kun esperantistino Hulda Berg.

La gazeto prezentas la unuan parton de la noveleto La Fluganta Homo. Jam en la unua parto aperas fantomoj logantaj al daŭrigita legado. La lastaj tri artikoloj estas tradukoj el revuoj en Esperanto. Pli ampleksa ol 85 jarojn poste estas la reklamo kiu kovras tujan paĝon, la lastan.

Jan Setrés

LA ESPERO

Organ for Esperantoforeneln i Svedio, uitgeven av Gefle Esperantoforening.

Organ for Esperantoforeneln i Svedio, uitgeven av Gefle Esperantoforening.
Organ for Esperantoforeneln i Svedio, uitgeven av Gefle Esperantoforening.

N:o 1	Redaktör: W. WAHLUND	Utgevar: W. WAHLUND	Febr. 1913
-------	----------------------	---------------------	------------


Anmälän. (Text about the magazine's purpose and subscription information.)
För och emot. (Text discussing the challenges and goals of the Esperanto movement.)

Samidenoj!
Abonu "La Espero"!


Multaj novaĵoj je la informejo de SEF



Estas kelkaj ŝanĝoj je la komenca paĝo de la informejo, i.a. pli elstaras la kapvorto "esperanto"



Virtuala Esperantujo kunigas la ttt-ejojn laŭ temoj kaj kunligas ilin por pli rapida retumado



SEF fanfaronas jam je la unua bonveniga frazo, ke ĝi havas la plej popularan esperanto-informejon en la interreto (www.esperanto.se). Scienca pruvon pri tio ni ne havas, sed 300 mil vizitoj en du jaroj estas mezuro pri la populareco de niaj paĝoj, kaj neniu alia esperanto-informejo proksimiĝas al tia cifero. Ĝuste nun ni havas pli ol 30 000 vizitojn ĉiun monaton kaj la nombro konstante kreskas.

Plej multe kontribuas al nia populareco la sekcio **Kiosko** (www.esperanto.se/kiosk/espindex.html), kies vizitantoj venas de ĉiuj kontinentoj de la mondo, plej ofte ne-esperantistoj. Sed dum la lasta duonjaro aldoniĝis sekcioj, kiuj rekte direktas sin al la esperantistoj, tiel ke ankaŭ la kvanto da esperantistoj vizitantaj nian informojn nun kreskas.

Virtuala Esperantujo

La plej grava aldono okazis en la aŭtuno, kiam estis kreita **Virtuala Esperantujo** (www.esperanto.se/virtuala).

La diversaj esperantistaj ttt-ejoj de unuopuloj kaj organizoj estas troveblaj en pluraj listoj. "Virtuala Esperanto-Biblioteko" estas tre bona registro pri tiaj ejoj, Flandra Esperanto-Ligo prizorgas bonan alfabetan liston. **Virtuala Esperantujo** plenumas similan bezonon, sed laŭ aliaj kriterioj.

La diversaj ttt-ejoj en **VE** estas organizitaj laŭ tem-rondoj. Ene de la sama rondo oni povas facile pasi de unu ttt-ejo al alia. La rondoj ankoraŭ ne estas tre vastaj, sed aldoniĝas pli kaj pli da novaj ttt-ejoj.

Estas pluraj avantaĝoj organizi la retumadon tiamaniere. Unu ekzemplo: Hartmut Traunmüller ĉe la Universitato de Stokholmo havas informojn pri diversaj interesaj temoj sur siaj paĝoj. Kelkaj el ili estas en esperanto, sed preskaŭ neniu sciis pri ili. Nun ili estas aldonitaj al diversaj rondoj de **VE** kaj facile troveblaj.

La kvanto da rondoj estas relative vasta (vidu kadron), tiel ke eblas trovi kategorion, kiu taŭgas. En kelkaj kazoj oni povas eĉ "membreigi" la ttt-ejon al pluraj rondoj. Tio okazis kun la informejo de KEF '98, kiu membras en Juna rondo, Kultura rondo kaj la rondo pri estontaj aranĝoj.

NUN: la plej rapida informilo

En marto ekfunkciis je la adreso www.esperanto.se/nun/ la elektronika bulteno **NUN**, kiu celas esti "la plej rapida informilo de la esperanto-movado". La informoj pri kio okazis-okazas estas aldonataj aŭtomate al **NUN** kaj legeblas tuj post la aldono.

Verkanto povas esti ĉiu esperantisto kun aliro al la interreto. La aldono al **NUN** okazas per plenigo de speciala formularo trovebla je la sama retadreso. Ne estas bezonata kodvorto por rajti aldoni informojn. La prizorganto tamen certigas, ke aldonoj, kiuj ne estas informaj, estos rapide forigitaj el la enhavolisto.

Aldone al la aŭtomata aperigo de la artikoloj estas aranĝite, ke la tekstoj kun t.n. x-kodigo (t.e. ĉ skribita kiel cx) aperas kun supersignoj al tiuj, kiuj retumas per Netscape Navigator 4 aŭ havas la tiparon E-Verdana instalita en sia komputoro.


Retumantoj, kiuj ne povas aliri kadro-bazitajn ttt-ejojn, povas legi la informojn en **NUN** per la adreso www.esperanto.se/nun/enhavo.html.

Esperantonytt fariĝas kolektiva tasko

Ankaŭ **Esperantonytt** (www.esperanto.se/enytt) iom ŝanĝiĝis en marto. Estis elpensita simila solvo kiel por **NUN**, tiel ke multaj povas aldoni informojn al la retbulteno. Ĝi ne plu dependas de nur unu persono, kies laborsituacio ne ĉiam povas permesi aktivan prizorgadon.

Por rajti aldoni informojn al **Esperantonytt** estas bezonata kodvorto, kiun ricevas ĉiu, kiu anoncis sin kiel kunlaboranto. Tio estas necesa por eviti, ke estu aldonitaj eroj, kiuj ne taŭgas tie. Franko Luin estas disdonanto de la kodvorto kaj li estas atingebla je la adreso franko@esperanto.se.

La ŝanĝo estas farita precipe por ke ne okazu longaj interrompoj en la liverado de informoj. Montriĝis, ke **Esperantonytt** rapide fariĝis populara ĉe la membroj de SEF kaj ke la interrompo kaŭzis multajn demandojn (kaj malbonan konsenton). Nun oni povas mem aldoni informojn kaj helpi en la informado.



Tagon post tago

Relative nova servo je la informejo de SEF estas *tpt* (www.esperanto.se/tpt/), kio estas mallongigo de "tagon post tago". Tio estas kalendaro de espe-



ranto-eventoj en la tuta mondo. Principe aperas en ĝi la bazaj informoj pri ĉiuj esperanto-aranĝoj kun dato, loko kaj kontaktadreso. Nuraj klubkunvenoj ne aperu tie, sed se la evento estas interesa por iom pli vasta rondo (ekzemple regiona renkontiĝo), ĝia loko estas en *tpt*.

Ankaŭ por *tpt* estis adoptita la solvo, ke oni mem registras la eventon plenigante specialan formularon. Por ke ne okazu misuzoj, estas aldonita kontrolŝtupo, kiu ebligas, ke ne aperu ŝajneventoj.

En *tpt* oni trovas la eventojn laŭ la komenca tago.



Plej amuza: la skribovando de SEJU

La plej amuza aldono estas la skribovando de SEJU, kiu ricevis la svedan nomon SEJUs Klotterplank (www.esperanto.se/klotter/). Simile kiel sur la fizikaj "skribaĉvandoj" oni povas skribi kion oni volas sur ĉi tiu "virtuala

vando. Plej ofte temoj nur pri salutoj, sed ankaŭ mallongaj diskutoj eblas.

SEJU utiligas por sia skribovando interesan teknikan solvon, kiu ŝajnigas, ke vere temas pri skribado sur vando. Eblas eĉ elekti la koloron de la "ŝprucfarbo", kiun oni uzos por sia mesaĝo.

Se la mesaĝon skribas esperantisto uzanta la x-kodigon, la esperantoliteroj aperas kun supersignoj al tiuj, kiuj uzas Netscape Navigator 4.01 aŭ pli posta – do simila solvo kiel por NUN (vidu la bildon ĉi-sube).

"Klaĉejo" preparata

Sed pluraj novaj servoj estas preparataj. Baldaŭ ekfunkcios "klaĉejo", kiu ebligas interretan babiladon (www.esperanto.se/ek/). La babilado okazas

en skriba formo – inter du aŭ pluraj partoprenantoj – kaj estas tuj legebla sur la ekrano. Tio taŭgas ne nur por klaĉado, sed ankaŭ por seriozaj interparoloj. Oni bezonas nur interkonsenti pri la tempo kaj aliri la "klaĉejon".

La "klaĉejo" de SEF estos publika kaj utiligos la teknikon skribi "cx" kaj vidi "ĉ" sur la ekrano.

Indas kontroli

Kiel vi vidas, indas kontroli relative ofte, kion novan SEF elpensis. La plej lastaj aldonoj celas la esperantistojn tutmonde, tial viaj amikoj eksterlande certe danke ricevos la informon pri niaj solvoj, almenaŭ tiuj, kiuj havas aliron al la interreto.

Franko Luin

JEN LA RONDOJ DE VIRTUALA ESPERANTUJO

RONDO ZAMENHOF

Membrigas la ttt-ejojn de esperanto-organizo je internacia, nacia kaj regiona niveloj. Celas unuavice la nefakajn esperanto-organizojn.

BONA RIDO

Temas pri ttt-ejoj kun humura enhavo: anekdotoj, rakontoj de humoristoj, desegnaĵoj – nu, la nomo mem diras, pri kio temas.

EDUKA RONDO

Instruistoj, pedagogoj – eble lernantoj – povas membriĝi al la rondo siajn ttt-ejojn, kiuj temas pri edukado en tre vasta senco.

ELDONA RONDO

Jen rondo por eldonejoj kaj libroservoj, kiuj povas prezenti al la esperantistoj siajn titolojn en stoko kaj siajn novajn eldonaĵojn.

ESPERANTEJOJ

Rondo, kiu membrigas la kursejojn kaj aliajn konstantajn ejojn de la esperantistoj. Temas pri "fizikaj" ejoj, ne la virtualaj.

ESTO

Tute speciala privata iniciato, en kiu aperas tekstoj "por la lastaj jaroj de la jarmilo", entute kvindek, kiam la projekto estos preta. Ne eblas aldoni proprajn ttt-ejojn.

GAZETARA RONDO

Rondo, kiu estas iaspeca kiosko kun esperanto-gazetoj aperantaj sur la interreto. Iom post iom pli da gazetoj membras en la rondo.

HISTORIA RONDO

Historia rondo prezentas ttt-ejojn, kiuj temas pri la historio de esperanto kaj pri unuopaj esperantistoj gravaj por la evoluo de niaj lingvo kaj movado.

INTERRETA RONDO

Rondo pri diskutejoj, adresaroj, interretaj kunvenoj k.s., kiuj iel rilatas al esperanto. Same bonvenas ttt-ejoj, kiuj temas pri ajnaj interretaj demandoj.

JUNA RONDO

Kiel la nomo mem diras, jen rondo por junaj esperantistoj – por tiuj, kiuj ne nur sentas sin junaj, sed estas tiaj. Povas temi pri kio ajn, kio interesas junajn homojn.

KLARA: VIRINA RONDO

Speciala virina rondo: pro kio? Por doni iom da balanco al la interreta mondo, kiu trograde estas vira afero. Ne devas temi pri specialaj "virinaj" aferoj, sed ja rajtas.

LA KLUBA RONDO

Membrigas la ttt-ejojn de la esperanto-kluboj tra la mondo kaj faciligas la retumadon inter ili. Devus esti unu el la plej grandaj rondoj!

KOMERCA RONDO

Rondo, en kiu komercaj entreprenoj povas prezenti sin kaj siajn varojn. Komercal organizoj, memkompreneble, rajtas membriĝi sin, sed devas esti en esperanto.

KRESKANTA KANTARO

La rondo celas kolekti ttt-ejojn, en kiuj estas troveblaj

kantotekstoj. La rondo estu konstante kreskanta, malfermita al pliaj kantoj originalaj kaj tradukitaj.

KULTURA RONDO

En la rondo membras ttt-ejoj kun kultura enhavo: pri arto, danco, filmo, teatro kaj alio. Aliaj rondoj temas pri muziko kaj libroj; kultura rondo estas pli vasta.

KUNVENA RONDO

Eble ne tute memklara nomo de rondo, sed vi trovos en Kunvena rondo informojn pri okazontaj kongresoj, seminarioj, kursoj, internaciaj kunvenoj k.s.

LEGOCIRKLO

Rondo por libroamantoj, en kiu aliaj libroamantoj prezentas, kion ili surretigis. Temas unuavice pri tutaj verkoj, sed mallongaj eroj same bonvenas.

LIBERTEMPA RONDO

Alia vasta rondo, kiu membrigas ttt-ejojn, kiuj prezentas libertempajn okupojn. Sed vi eble trovos libertempajn okupojn en iuj membrigitaj ttt-ejoj.

LINGVA RONDO

Jen rondo por (kaj pri) lingvo-interesitoj: ne nur kun ttt-ejoj pri esperanto, sed pri kio ajn alia lingvo. En esperanto, kompreneble.

MUZIKA RONDO

La rondo ne bezonas klarigon pro sia memklara nomo, sed indas emfazi, ke povas temi pri kio ajn muziko, ne nur la muziko de esperantistoj.

POEZIA RONDO ORFEO

Kelkaj versoj por harmonie fini la tagon? Eble Poezia rondo, kiu membrigas ttt-ejojn kun poezia enhavo, povos helpi al vi en tio.

POLITIKA RONDO

Iuj diras, ke ideologioj mortis. Se via ttt-ejo enhavas erojn, kiuj pravas / malpravas tion, jen rondo por viaj politikaj kaj ideologiaj rezonadoj.

RADIO-RONDO

En la rondo membras la radiostacioj kun esperanto-disendoj, sed ttt-ejoj kun rilata temo (radio, televido k.s.) povas same bone trovi sian lokon en la rondo.

RELIGIA RONDO

Plii rondo, kies nomo ne bezonas klarigon. Povas temi pri ttt-ejoj, kiuj prezentas iun religion, movadon, grupon, sed same pri gravaj tekstoj de tiuj religioj.

RONDO FAMILIA

Speciala rondo por familioj, kiuj uzas esperanton en sia familia vivo, kaj iliaj bezonoj. Kunlabore kun la samnoma komisiono de UEA.

SCIENCO & TEKNIKO

Jen plia vasta rondo, en kiu membras – eventuale – ttt-ejoj kun tiel malsamaj temoj kiel astronomio, papilioj, parolaŭtomatoj kaj forstado.

STRIKTE PERSONE

Se vi ne havas specialajn interesojn vi povas membriĝi vian ttt-ejon al la strikte persona rondo. Neniu povos diri, ke la ttt-ejo estas eksterterma...

La vaŝoj^o

Eble jam malaperis

Regiono en la usonaj ŝtatoj Nevado kaj Kalifornio estas la tradicia teritorio de la vaŝoj. Estas unu el la multaj malgrandaj popoloj de Usono kiuj preskaŭ ekstermiĝis unue pro eŭropa imperiismo kaj poste pro la fortega premo de nacia kulturo. Meze de la pasinta jarcento ankoraŭ ĝis 3000 personoj parolis ilian lingvon. Hodiaŭ oni ne scias kiom da vaŝoj restas, sed oni taksis la nombron je 850 en 1960. En *The Two Worlds of the Washo* (La Du Mondo de la Vaŝoj) de 1966 la antropologo James F. Downs kompilis historiajn konojn kaj rakontojn de maljunaj vaŝoj, konstatante ke la vaŝoj neniam atakis la blankulojn, tiel nur instigante malestimon. La opinio de la vaŝoj pri la blankulo manifestiĝis en la vorto kiun ili uzis pri la fremdulo, *mushege*. Tiu vorto signifas "sovaĝa", kaj estis uzata ankoraŭ pri fero-caj bestoj.

Ekde la 1850-aj jaroj la vaŝoj eka-doptis la kulturon de la blankuloj. En la 1930-aj jaroj oni estis perdintaj siajn formalajn estrojn kaj socian strukturon. Oni ne havas rezervejon, kaj ne plu funkcias kiel aparta popo-lo.

Vivrimedoj

La vaŝoj tradicie estis ĉasistoj, fiŝkaptistoj kaj kolektistoj. Oni ne havis proprajn agrojn, kaj brutojn oni kaj mal-estimis kaj malŝatis. La brutoj ja damaĝis la sovaĝajn plantojn kaj rivalis kun la sovaĝaj bestoj. La eŭropdeve-naj farmistoj ne dungis vaŝojn por paŝtigi siajn ŝafarojn, sed preferis vas-kojn el Hispanio, kiuj estis spertuloj (Vidu la artikolon en numero 4/97 de La Espero).

Komence de la jaroj la vaŝoj kuti-mis malsati, ĉar elĉerpiĝis la stokoj de semoj kaj viando. Kiam la neĝo dege-lis, oni iris al la granda lago Tahoe por fiŝkapti. En junio preskaŭ la tuta po-polo estis ĉe la lagbordo.

Fakte oni povis fiŝkapti eĉ vintre de sur la glacio tra truoj; per hoko sur ŝnuro, jetlanco aŭ eĉ reto etendita in-ter du truoj.

En la somero oni povis kapti fiŝojn eĉ per korboj. Oni ne konis alian me-todon konservi la fiŝojn krom sekigi la fileojn per la sunradioj. La lumo de torĉoj ebligis la fiŝkaptadon nokte. Ki-am oni uzis jetlancon, oni devis kon-sideri la refrakton de la lumo de la fiŝo

transpasante la akvosurfacon. Nun-tempe neniu kaptas fiŝojn per jetlan-co.

La vaŝoj ankoraŭ kolektis i.a. semojn, cepojn, sukerkanon, fragojn, rabar-bon kaj terpomojn. La kolektado estis laboro de la virinoj. Dum la someroj la viroj ankoraŭ fiŝkaptis, kaj la virinoj vagadis sur montetoj kaj herbejoj kolektante per bastonfosilo kaj korbo.

Oni devis vagadi pro ripeta elĉerpo en lokoj kie oni kolektis, kaj pro nesamtempa maturiĝo de ekzemple se-moj de graminacoj en diversaj lokoj. Aŭtune oni kolektis piniograjnojn kaj glanojn, kiujn oni devis iel konservi por la vintra stoko. La glanojn oni de-vis senŝeligi, mueli al faruno, kion oni efektiviĝis per rokgrunda pistujo, kaj malplenigi je tanacido, kion oni faris metante la farunon en malprofundan kaveton en la sablo kaj poste verŝan-te varman akvon sur ĝin. La ununu-ra tabuo rilate kolektadon estis kontraŭ rompo de branĉoj de la pinioj; sufiĉe racia tabuo. La kolektado estas kultura trajto kiu ankoraŭ regas ĉe la vaŝoj, laŭ la aŭtoro.

Ĉasado, same kiel kolektado, kom-encis printempe, sed estis la privilegio de la viroj. La ĉefa armilo estis pafar-ko kun besta tendeno. La sagopinto estis farita el siliko aŭ obsidiano. La lerteco de la ĉasistoj tamen verŝajne estis tre modesta kompare kun tiu de sportaj arkopafistoj de hodiaŭ. Lia sukceso pli dependis de tre lerta ŝte-liro. Tiun li praktikis ĉasante cervojn, plej ofte kamuflita per masko de cer-vokapo kun la ŝultroj vestitaj per la felo. Alproksimiĝante gregon da cer-voj li eĉ imitis la agojn de vircervo al-paŝanta fremdan cervaron. Li ĉiam iris alvente por ke lia odoro ne mal-kaŝu lin. Je distanco de malmultaj metroj li pafis la cervon.

La plej grava ĉasaĵo tamen estis la kuniklo. La ĉasado de kunikloj estis laboro kiu favoris kunlaboron, tiel ke vico da homoj irantaj sur ebenaĵo timi-gis la bestojn, formis kurvon kiu kunpremis la ĉasatojn kaj devigis ilin kuri en longan reton. La felojn de la kunikloj oni uzis por produkti la plej gravan vestaĵon, kiun oni ankoraŭ uzis kiel litkovrilon.

Alia ĉasata mamulo estis la urso, sed malofte oni manĝis la viandon. Same kiel aliaj popoloj en la norda he-misfero, la vaŝoj konsideris ĝin kiel preskaŭ sanktan beston.

Spiritoj kaj Akvaj Beboj

La vaŝoj ankoraŭ ĉasis diversspecajn birdojn. La rajton ĉasi aglojn en cer-ta regiono filo heredis de sia patro. La aglon oni konsideris kiel mesaĝiston al la spirita mondo. Oni alte estimis la plumojn de agloj, kaj ili estis uzataj en interŝanĝa komerco.

La spiritoj de la mortintoj timigis la vaŝojn. Ili estis venĝemaj, unue pro malbona enterigo je la morto, kaj poste pro multaj aliaj pekoj kiujn povis fari la vivantoj. La spiritoj povis reveni por suferigi la vivantojn, ekzemple kiel polva kirlovento. Tial oni malhel-pis la revenon de la spiritoj i.a. per bruligo de la hejmo de la mortinto.

La supernaturaj estaĵoj de la vaŝoj kiuj laŭ la verkisto ankoraŭ ludas gra-van rolon estas la Akvaj Beboj. Kom-ence de nia jarcento ŝamano svenis en la akvo de rivereto. Lin renkontis Akva Bebo, kiu kunprenis lin al la lan-do de la Akvaj Beboj por kunveno kun la reĝo. Kvin junaj knabinoj amuzis la ŝamanon kaj instruis al li specifan kanton. Poste la gvidanta Akva Bebo revenigis lin al la surfaco, kie li vekigi-s flosante sur la akvo.

La Akva Beboj estas inter ses kaj naŭ decimetrojn longaj kaj havas lon-gajn nigrajn harojn, kiuj ne tuŝas la grundon sed iel ŝvebas. Ili estas grizaj kaj je tuŝo gluecaj. Ili havas eksteror-dinanan potencon kaj troviĝas en ĉiuj lagoj, riveroj, basenoj k.t.p. Ĉiuj vaŝoj iam aŭdis la ululon de Akvaj Beboj lo-gantaj la homojn al la akvo nokte.

La lingvo

La lingvo de la vaŝoj ne similas tiun de la proksimaj popoloj en Nevado. Oni kredas, ke la parencaj lingvoj troviĝas en Kalifornio. Ĉiuj vaŝoj parolas kaj la vaŝan kaj la anglan, eble escep-te de kelkaj gejunuloj kiuj ne parolas sian gepatran lingvon.

Downs mecias ke la vaŝa lingvo es-tas riĉa je terminoj pri parenceco. Oni nombris ĝis 54 terminoj. I.a. oni dis-tingas pli junan de pli maljuna frato aŭ fratino. Same pri la gekuzoj. Tro-viĝas terminoj por la nepoj de gefra-toj k.t.p.

Kio estas Kampanjo 2000?

KORESPONDUI!

Irana esperantistino 34-jara, kiu estas bibliotekistino kaj havas licencion pri informscienco volas korespondi kun gesamideanoj.

Mary am-Sarmasti
P.O. Box 14455/137
Tehran
Iran

...

En 16-ĝrig polska som deltar i esperantokurs med 14 elever vill brevväxla med svenska tonåringar. Hon har fått första premie i att läsa poesi.

Krystyna
Oldziejewska
str. Lakowa 34
PL 19-300 Elk
Polen

...

Arkeologia studento, kiu interesigas pri sveda arkeologio, precipe la vikingoj, volas korespondi kun junulinoj kaj knaboj pri ĉiuj temoj. Li estas 38-jara komentanto. Satas muzikon, kinon, promenojn, sportojn, vikingojn k.t.p. Sendos foton post ricevo de foto.

Luiz Carlos dos Santos
Carolina Machado
2046-Ap-203
21610 150 Mal.
Hermes, R.J.
Brazilo

...

19-jara studento, studanta arkeologion en Jagiellona Universitato en Krakovo. Interesigas pri historio, arkeologio, astronomio, sveda kulturo.

Karol Dziegielewski
Kazimierz 35
PL-84-230 Rumia
Pollando.

La unua ideo en Prago

La prezidanto de la Universala Esperanto-Asocio, la korea profesoro Lee Chong-Yeong, dum la Universala Kongreso de Esperanto en Prago en 1996 lanĉis la ideon pri *Kampanjo 2000*. La origina ideo estis entagordiĝi la lingvan problemon kaj Esperanton ĉe la Unuiĝintaj Nacioj kaj aliaj internaciaj organizaĵoj dum la transiro al la nova jarmilo.

Dum la kongreso oni hezitis pri la eble tro ambicia projekto, sed tamen decidis eklani dum sekvontaj monatoj.

Post Prago

En la aprila numero pasintjara de Esperanto Renato Corsetti de la komitato de UEA kaj Lee kiel reprezentanto de la estraro skizis dokumenton prezentotan al la kongreso en Adelajdo. La du aŭtoroj unue priskribas du premisojn:

1^o ke la Esperanto-movado en kelkaj landoj/medioj dum la lastaj jaroj progresis, sed en aliaj malsukcesis, kaj pli favoran sintenon de la publiko aŭ instancoj rilate Esperanton ni en pluraj landoj ne kapablus ekspluati.

2^o ke ni bezonas sciojn pri "potencfluroj kaj tendencoj en la nuntempa mondo" kaj pri la sinteno de la ĝenerala publiko al fremdaj lingvoj, por konsciigi homojn pri la neceso de nova solvo de la lingvaj problemoj, celante al respekto por ĉiuj lingvoj kaj kulturoj.

Sekve de la premisoj oni proponas tri ĝeneralajn celojn.

1. Levi la organizon kaj idean nivelon de la Esperanto-komunumo.
2. Levi la prestiĝon de la internacia lingvo.
3. Influi la internacian vivon. Precizigante la celojn oni mencias aron da prioritataj taskoj rilate ĉiun celon. Kelkaj el tiuj taskoj estas difinitaj kiel taskoj de landaj organizaĵoj.

Rilate la unuan celon:

- Ĉiu landa... organizaĵo difinu... konkretan celgrupon varbotan kaj konkretan membronombron atingindan, kaj ĝi ekagu laŭ tiuj celoj.
- Ĉiu landa... organizaĵo pretigu programon de klerigaj okazoj por siaj membroj...
- La landaj organizaĵoj zorgu ke la landaj ILEI-sekcioj estu pli fortaj kaj kunligu ĉiujn instruistojn en la unuopaj landoj.

Pri la dua celo:

- La landaj... organizaĵoj prizorgu la tradukon kaj disvastigon de tiuj informiloj [kiuj donas korektan bildon de Esperanto/Rim. de red.] al siaj lokaj kaj aliaj grupoj.
- ... la landaj... organizaĵoj transiru de pasiva informado (nur al pentantoj) al aktiva informado (al la membroj de la homgrupoj supre menciitaj [instruistoj, lingvistoj, ĵurnalistoj, politikistoj.../Rim. de red.]...)

Pri la tria celo:

- La estraro de UEA instigu landajn Esperanto-organizaĵojn starigi kontaktojn kun siaj registaroj kaj tute aparte kun la landaj instancoj kiuj tenas ligojn kun internaciaj organizaĵoj.

En la dokumento oni krome emfazas ke ĉiu organizaĵo ellaboru sian propran laborplanon rilate sian propran agadkampon, kaj ke ĝi partoprenu laŭ siaj ebloj kaj kompetentoj. "En la venontaj jaroj, ĝis la jaro 2000, ĉiu devos streĉi siajn fortojn por komune antaŭenporti la internacian lingvon al tiu pli firma pozicio en la mondo dum la venonta jarcento kiun Esperanto meritas."

Oni ne devis atendi la kongreson en Adelajdo por konstati ekagon. Reprezentantoj de UEA en Parizo interparolis kun la respondeculo pri la Unesko-programo Linguapax kaj en Novjorko ekagis por starigo de Koalicio por Internacia Lingvo de NRO-j (Neregistaraj Organizaĵoj) en rilatoj kun UN. La estraro de ILEI eklaboris planon pri mondaj lernejoj kaj kampanjoj, novaj lernolibroj k.t.p. Ankaŭ pluraj landaj organizaĵoj ekagis.

En Adelajdo kaj poste

Dum la UK en Adelajdo la tri menciitaj ĝeneralaj celoj de Kampanjo 2000 estis konfirmitaj. Ankaŭ kristaliĝis la celoj en pluraj konkretaj planoj kiel ekzemple; eksperimenta instruado de Esperanto 1998-2000, kampanjo Pli-vastigu Verdujon 1998-2000, disvastigo de informiloj pri Esperanto 1997-2000 kaj kampanjo por internacia lingvo ĉe UN 1998-2000.

La estraro de SEF dum sia kunsido en novembro ektuŝis demandojn pri pli efika informado kaj intencas aranĝi fruprintempan konferencon pri la temo. La ĵeto estas farita ankaŭ en nia lando.

Esperanto-Centro ankaŭ en Irano

El Irano ni ricevis leteron pri nova Esperanto-Centro:

Estimataj, Irana Esperanto-Centro estis fondita je la 30-a de oktobro 1997. Ĝi funkcias kiel Esperanta oficejo kaj estas diversaj eblecoj kiujn la esperantistoj povas profiti.

Ĉiam iu respondeculo funkcias en la centro kaj estas aranĝataj diversaj E-kursoj en la centro.

Eksterlandanoj povas tranokti en la centro kaj pri tiu afero oni devas antaŭinformi la centron. Estas diversaj kunsidoj aranĝataj semajne, duonmonate, monate kaj sezone.

Nome de la centro mi invitas vin al reciproka interrilato por evoluigi la rilaton kaj interŝanĝi Esperantajn novaĵojn.

Nia koresponda servo estas je via dispono kaj tiel ni intencas pli vigligi la rilaton inter unuopaj gesamideanoj. Pri ĉio ajn Esperanta afero ni estas pretaj kunlabori, kunagadi kaj informi.

Bonvolu se Vin interesas la rilato kun Irana Esperanto-Centro ne hezitu kontakti nin!

Sincere salutas,

M. Reza Torabi

KALLELSE

*Andelsägarna i Förlags-
föreningen Esperanto
kallas till årsmöte den
16 maj e.m. på Frogg's
Hotel i Nacka.*

Styrelsen

Jan Setréus

Karl Söderberg 95-jara

Aktivaj sindediĉaj esperantistoj vivas longe. Tion evidente montras la esperantista gazetaro sur siaj paĝoj pri aĝo-jubilantoj.

Alia trajto ĉe longe vivantaj esperantistoj estas ilia intereso pri kulturo en diversaj formoj. Karl Söderberg ne nur estis konsumanto de kulturo, sed li vere helpis, subtenis kaj stimulis homojn sur la kultura kampo. Se oni scias, ke li estis prezidanto de la komunuma konsilantaro de la urbo Uppsala kaj direktoro de ĝiaj lernejoj, estas facile kompreni, ke li povis influi aliajn al kulturaj aktivecoj.

Esperanto estas sendube kultura fenomeno de si mem, kaj la kombino esperanto kaj ĝenerala intereso pri kulturo versajne bone funkciis ĉe Karl Söderberg. Malgraŭ granda peza ŝarĝo de komunumaj taskoj li havis tempon gvidi Svedan Esperanto-Instituton, viziti UEA-kongresojn, esti membro de Akademio de Esperanto kaj aperi kurtonde en radio dum tiu tempo, kiam la sveda radio akceptis tiujn elsendojn.

La nomo Karl Söderberg troviĝas inter la nomoj pri Honoraj Membroj de UEA. Li estas gratulinda pro atingo de alta aĝo, kaj la esperantistaro estas gratulinda pro tio, ke ni havas tiajn membrojn inter ni.

R.L.

Skriftliga prov

Svenska Esperantoinstitutets
skriftliga prov för högre och lägre
examen äger rum på olika platser i
landet söndagen den 26 april
1998.

För information och anmälan,
kontakta

Ebbe Vilborg, Prästgårdsängen 2,
412 71 Göteborg

Telefon 031 - 40 52 74

Monda solidareco

Pri internacia solidareco ni povas legi en la membroletero de la Esperanto-klubo de Kungälv, unue el la jarraporto:

Internacia apoglaboro

14 klubanoj apartenas al **Monda Fonduso Solidareco kontraŭ Malsato**. La fonduso donas rektan helpon al vilaĝoj en evolulandoj, antaŭ ĉio al projektoj, kiuj celas al propra nutrado, ekz. pura akvo, pli bona manĝo kaj edukado.

Ni ankaŭ sendis iom da mono kaj pakajo al Bona Espero en Brazilo, al homoj en Afriko kaj Sri Lanko. Pluraj leteroj kun petoj pri helpo venis, sed ne ĉiam eblas transsendi varojn aŭ monon, ekz. al Tanzanio...

Ĉu vi jam estas unu el la apogantoj de la **Monda Fonduso Solidareco kontraŭ Malsato**, aŭ ĉu vi volas fariĝi apoga membro de tiu organizo? 14 el la klubaj membroj jam aliĝis. Jen informoj al tiuj!

Nun estas tempo pagi por 1998. La minimuma kotizo egalas al **la kosto de unu taga manĝo**.

La kotizo do povas varii, afrikano ekz. pagas pli malgrandan sumon ol eŭropano, sed tamen ambaŭ pagas saman valoron. Ankaŭ povas varii en nia klubo. Vi mem decidus. Ĉiu kontribuo gravas.

Sendu la sumon al la klubo kaso, poste ni komune ensendas al Francio.

Krom tio, ke vi per via kotizo helpas al vilaĝanoj en evolulandoj nutri sin mem, vi ricevos la gazeton **Monda Solidareco** kun multe da interesaj artikoloj 4-foje jare. La tero povas nutri ĉiujn, se ni nur solidare agas, estas la moto de la fonduso.

El la **Membroletero de la Esperanto-klubo de Kungälv 1/98**

(La adreso de la organizaĵo estas:

Monda Fonduso Solidareco
kontraŭ Malsato
15 Rue Victor Duruy
FR - 75015 Paris (Francio)

Ne nur unu lingvo

La malplimultlingva komitato (*Minoritetspråkskommittén*) proponis komence de la nova jaro, ke Svedio agnosku kiel malplimultlingvojn de la lando la finnan (suoman), la laponan kaj la ciganan. Oni ne distingas dialektojn de la lingvoj, sed proponas specialan protekton por la finna kaj lapona en plej norda Svedio kie la parolantoj de tiuj lingvoj povu uzi ilin en kontaktoj kun aŭtoritatoj. Oni tamen ne proponas ŝanĝojn de la konstitucio.

(El **Metro 8/1 1998**)

NEKROLOGO

Sixten Clausson 1913-1997

Unu el niaj plej malnovaj membroj forlasis nin. Sixten aliĝis al la klubo 1935, kaj tre baldaŭ li diversmaniere aktiviĝis.

Li estis elektita porti nian belan standardon, li estis vicstudgvidanto kaj poste bibliotekisto. Kiam li prizorgis nian bibliotekon, li samtempe vendis librojn por Eldona Societo en Stokholmo kaj havis fiksitan deĵortempon ĉiusemajnan.

En 1943 li fariĝis studgvidanto. Kiam mi 1948 eklernis Esperanton kaj aliĝis al la klubo, Sixten estis bona apogo por ni komencantoj. Post nia trimonata rapidkurso li instigis min partopreni konversacian rondon en la someraj monatoj kun tiuj, kiuj estis studintaj du semestrojn. Tiel ni parole pliperfektigis antaŭ la 33-a UK en Malmö. Sixten same kiel pluraj aliaj klubmembroj, havis multe da laboro antaŭ kaj dum la kongreso, sed li ta-

men ĉiam estis preta servi al ni malpli spertaj. Kiam li komence de 1949 por kelkaj jaroj ne servis kiel studgvidanto, li konstruis sian belan domon en Arlöv, al kiu ni poste ĉiam estis bonvenaj. Loĝante en Arlöv li ree tre aktiviĝis, i.a. kiel studgvidanto kaj kiel kursgvidanto. Siajn kursojn li per aŭtobusvojaĝoj gvidis al diversaj kongresoj. Kaj en mi restas kiel bela memoro tiun kursfinan feston ĉe IOGT, kie liaj kursoj prezentis mirindan parolkurson, kiun Sixten verkis.

Li ankaŭ kontribuis al pibeligo de niaj diversaj kluboj.

Malgraŭ la granda ŝarĝo kiun Sixten portis por nia klubo, li diversmaniere havigis al si profundajn sciojn pri diversaj fakoj.

De kie li prenis la forton por ĉio, mi ne komprenas. Ni ĉiuokaze perdis sindonon, bonkoran kaj inteligentan membron.

Al liaj edzino Maj-Britt, filino Marie-Louise kaj nepoj ni kondolencas.

Gulli Svensson

Malmö Esperantoförening
Kronetorpsg 94
21227 Malmö

Esperantoförbundet, Vikingagatan 24, 113 42 Stockholm



KRUCVORTA ENIGMO



Horizontale


- 1 Estas unu bordo en Afriko - Panmaterial'
- 2 Rilata al bonfara homo
- 3 Senreliefa - Movos sin
- 4 Komenco de klaso - Nazo de elefanto
- 5 Transportujo por rabobesto
- 6 Metale - Murdint' en la biblio
- 7 Loĝanton en sudeŭropa ĉefurbo - En okazo
- 8 Estr' - Estas ofte maro dum milito
- 9 Faris ion interesanta
- 10 Rifuzint' - Pagilo

Vertikale

- A Forta impres' - Malbonan
- B Libropruntejo
- C Home - Kunligi plantojn
- Ĉ Amfibi' - Organ' - En runo
- D Membrokolektaĵo - Ŝatata person'
- E 8 - Rivereg' en Afriko
- F Privatan sektoron en DDR - En rimo
- G Riparo de sangovazo
- Ĝ Femal' kuranta
- H Trinkujo - Maljesas

Lennart Persson

REBUSO



SOLVO DE 97/6

	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G	Ĝ	H
1	B	U	T	E	R	P	A	N	O	N
2	I	T	A	L	E	R	E	N	A	
3	C	I	V	I	T	A	N	O	J	N
4	I	L	O	N	F	O	S	O	S	
5	K	A	L	D	E	N	T	E		
6	L	O	P	E	R	E	O	N		
7	A	T	A	M	A	N	T	A		
8	N	I	U	L	E	K	S	O	Z	A
9	T	A	R	A	N	T	E	L	O	N
10	O	R	N	I	T	O	L	O	G	O

(Solvo de la rebuso 97/6: Dukatoj sennombraj sur la tero)